



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 3-a de Decembro 2018

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Matilda Landaŭ, Eran Vodevoz, Dror Gaon, Gabi Zeevi.

Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de Novembro 2018) – publikigita en la retejo.
<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201811>.

1. Raportoj

- a) Amri komencis novan E-kurson "Nicocot" en mezlernejo de Modiin kun 11 lernantoj.
- b) Miĥal traktis kun Efrati pri la ZV (11/12). Li prizorgos la seĝojn, tablojn, boligilon.
- c) Jehoŝua prelegis (22/11) pri E-o ĉe Ajelet (Societo por pritema filatelo).

2. E-kursoj en Tel-Avivo

- a) Daŭriga kurso: Doron sukcese komencis la 26-an de novembro. Aliĝis 12 lernantoj (la pagon kolektis Joela), kaj ĉeestis ankoraŭ kelkaj klubanoj. Ĝi daŭros ĝis komenco de januaro.
- b) Mikaelo gvidis senpagajn lecionojn la 12-an kaj 19-an de novembro. Partoprenis ĉirkaŭ 6 kursanoj kaj pluraj klubanoj.
- c) Eldad konsentis instrui 15 lecionan kurson por komencantoj ekde la 14-a de januaro 2019. Amri proponas rekompencan po 300 NIS por leciono + VAT (Eldad esploris kaj ne povas ricevi ĝin kiel stipendion). Sume: 5265 NIS. Eldad rezignos por unu jaro pri la membreco en la Estraro. *Voĉdono: unuanime akceptita!*
- ĉ) Ni devos komenci la reklamadon unu monaton anticipe (en Facebook, kaj anonco en Haaretz).

3. Zamenhofa Vespero kaj Landa Kunveno - la 11-an de decembro

- a) Devas nomumi anticipe prezidanton de la kunveno. – Elvir akceptis!
- b) La arta parto estos dispersita en la oficiala parto, por ke la publiko ne enuiĝu kaj forlasu
- c) Disdivido de taskoj por regalo: Nava Bilitzki alportos la botelojn, Judit kaj Avigail la manĝaĵojn.
- ĉ) La oficiala parto (en la kadro de Landa Kunveno): *(Ni devas protokoli tiun parton!)*
 - 1) devas aprobi la decidon por pagi vojaĝelspezojn por oficialaj kaj devigaj veturoj;
 - 2) necesas prezenti la intencon aĉeti oficejon kaj voĉdonigi la precizan celon laŭ la decido en la pasinta kunsido (30-40 m en Tel Avivo por klubkuvenoj kaj kursoj, aŭ aliaj eblecoj);
 - 3) Agada raporto de la prezidanto de ELI pri la ĵus finiĝanta jaro;
 - 4) Financa raporto de la kasisto: 2017 jam finiĝis, 2018 ankoraŭ ne finiĝis -> ne bezonata!
 - 5) Varbado de kotizoj por ELI kaj por UEA (la ĉefdelegito);
 - 6) Balotoj - demandi ĉu estas aldonaj kandidatoj, kaj ĉu iu petas ne-blokan, kaj/aŭ sekretan voĉdonon;
 - 7) devas elekti kontrol-komitaton;
- d) Arta parto (Matilda): ŝi donos la liston de la programeroj, Amri miksos kun la oficialaj temoj, printos, kaj donos al Elvir kaj Matilda. 2/...



4. Oficejo kaj Financoj

- a) Hipoteko (Bank Mizrahi)? Prunto (tro alta interezo?)
- b) Kiel statas la retiro de la kapitalo de ELI el Menora? – Al Bank Igud – sed ankaŭ ili postulas notarian aprobon. Retiro el la konto ĉe UEA? – progresas.
- c) Financa raporto: Ŝlomo dissendis

5. Israela E-isto (Mikaelo)

- a) Mikaelo finis enpaĝigi la tutan n-ro 166 (vintro 2018). La provlegantoj, Gabi kaj Eldad finis la korektojn (Amri sendis Word-version al ili).
- b) Post presado, la disdonado estos surloke dum la Zamenhofa Vespero (bezonatas listo!), kaj poste – dissendado.

6. IK-20 Eilat+Akaba

- a) Amri sendis al Dror la detalojn por israelanoj: prezoj, kondiĉoj, postkongreso.
- b) Jam urĝas krei la retan aliĝilon por israelanoj! (Dror)
- c) Propono de Amri: israelanoj anticipu pagu la programkoston. Ĝi estu 150 NIS (5 tagoj anst. 3), sed ĝis la 31/12 estos rabatita pago de nur 100 NIS. Por la ne-esperantisto de la paro: duono (50 sikloj nun, ĉiam la duono de la relevanta sumo).

7. UEA kotizsanĝo - Jehoŝua preparos plendleteron al Mark Fettes

8. Jagil Amri konsultis adv. Modan, kiu respondis ke praktike ne estas multo farebla. Ĉu tamen sendi al li advokatan leteron por anticipi liajn estontajn fiagojn? Propono: adv. Moran preparu leteron. Eran: Ni devas *antaŭe* pripensi, kion ni povas fari en kiuj kazoj, kaj nur oficialigi *poste* per la advokato. Se ni konsultos kun li kaj atendos ke li formulu la leteron, tio kostos al ni multe pli! Gabi: onidire ni ne povas ne enlasi lin en niajn publikajn, malfermitajn kunvenojn. Eran kaj aliaj: sed ni povas minaci lin per foriga ordono, ke se li trapasas ĝin, ni postulos de li monan rekompencan per juraj iloj al la damaĝoj kiujn li kaŭzis al ni.

La venonta kunsido: 7-a de Januaro 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi